

# Rabistoj kaj banditoj

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno. La 18an de februaro 2026

Akirado de havaĵo de aliuloj pere de perforto aŭ minaco de la perforto akompanas tutan historion de la homaro. Plej multe al rabado helpis militoj kaj ĥaoso, kiun ili kaŭzis. En mezepoko militestroj ofte komencis militojn aŭtune, ĉar en vilaĝojn estis freŝaj rikoltaĵoj. Konfiski nutraĵojn de malamiko signifis elimini lin el batalkampoj, ĉar la malamiko, kiu preskaŭ mortas de malsato, ne plu kapablas efike batali. Laŭkutime armeoj serĉis nutraĵojn ĉe kamparanoj nediferencigante teritoriojn proprajn kaj malamikajn.

Eksaj soldatoj ofte fariĝis rabistoj, ĉar ili ne kutimis labori, havis armilojn kaj sen-skrupule ilin uzis. Rabistoj estis ankaŭ vilaĝanoj, kiuj perdis siajn hejmojn, ekzemple post la tridekjara milito (1618-1648) Petranoj (ĉeĥe: Petrovští) proksime de Prago. Homoj, kiuj kaŭze de la milito perdis hejmojn, tute sovaĝiĝis kaj grupe atakis homojn.

Pri multaj rabistoj oni eĉ ne scias, ĉar oni ilin neniam kaptis, pri aliaj atestas oficialaj protokoloj pri iliaj esplordemandoj kaj ekzekutoj, sed pli ofte oni scias legendojn ol faktojn.

Ĉu vere ili "priŝteladis riĉulojn kaj pridonacadis malriĉulojn"?

Jen kelkaj biografioj – sen legendoj:

## RABISTOJ DE MORAVIO KAJ BOHEMIO

### Jan Jiří Grasel (1790 – 1818)

Jan Jiří Grasel, naskiĝis en la jaro 1790 en moravia vilaĝo Nové Syrovce (sude de Třebíč). Lia patro estis kadavraĵisto, sed ankaŭ ŝtelisto kaj rabisto, kiu longtempe estis malliberigita en Špilberk en Brno. Ankaŭ patrino estis ŝtelistino. Jam en sia infanaĝo Jan devis ŝteli kaj ŝtelitan monon doni al sia patro. Tiu ĉi „klerigado“ influis tutan lian mallongan vivon. Grasel sciis nek legi nek skribi, sed flue parolis ĉeĥan kaj germanan. Li fariĝis rabisto, vera krimulo kaj eĉ murdisto, kiu kun sia rabaro terorigis sudan Moravion, sudan Bohemion kaj nordan Aŭstrion.

En la jaro 1812 Grasel mortigis gastejstron, nome Michael Witzmann.

Pro mono li en la jaro 1814 en aŭstria urbeto Zwettel batmortigis 66-jaran vidvinon Marian Schindler-on.

Lia rabaro ne estis tre organizata, Grasel ofte uzadis diversajn pseŭdonimojn, kaŝis sin en armeo, sed baldaŭ dizertis, dumtempajn rifuĝejojn li serĉis ĉe diversaj amantinoj kaj inter romaoj. Post krimo li kapablis nokte piede iri eĉ 30 kilometrojn, pro tio tiama polico longtempe ne kapablis lin kapti.

En Aŭstrio li aĉetis domon por sia partnerino, kiu naskis lian infanon.

Polica agento David Mayer lin trovis kaj kaptis. Li amikiĝis kun unu el multaj fianĉinoj de Grasel (li helpis al ŝi fuĝi el malliberejo), poste kun la rabisto, al kiu en gastejo metis opion en kafon. Sed la opio ne funkciis, Grasel ne ekdormis. Pro tio al Mayer helpis kelkaj fortaj kamparanoj kaj soldatoj.

Juĝo akuzis Grasel-on pri du murdoj (Witzmann, Schindler) kaj 205 rabadoj.

La 31an de januaro 1818 en Vieno oni Grasel-on kun du kompanoj pendigis. La ekzekuton rigardis preskaŭ 60 milojn da homoj. Liaj lastaj vortoj estis: „Jesuo, tiel multe da homoj!“

En kolokva ĉeĥa lingvo lia nomo fariĝis sinonimo de fiulo (*grázl*).

## Václav Babinský (1796 – 1879)

Václav Babinský naskiĝis en la jaro 1796 en Litoměřice. Lia patro estis taglaboristo. Familio baldaŭ translokiĝis en Pokratice.

Dum sia militservo Babinský simulis frenezulecon, pro tio oni lin tenis en psiĥiatria malsanulejo. Ekde la jaro 1824, kiam oni lin liberigis, Babinský vivis kiel vaganto.

En la jaroj 1825 kaj 1829 oni lin ekzaminis pro ŝtelado, sed vane, ĉar mankis atestaĵoj.

Nur inter la jaroj 1830 – 1833 Babinský faris kelkajn krimojn.

En la jaro 1833 li murdis per sia tranĉilo. Sed Babinský fuĝis en Pollandon. En la jaro 1834 oni lin en Pollando malliberigis kaj en aprilo 1835 sendis reen (laŭ alia versio Babinský mem revenis kaj oni lin kaptis apud Pokratice).

Inter vagantoj li trovis sian partnerinon (Apolena Hoffmannová).

Li uzadis falsajn nomojn (nomojn de lokaj homoj) kaj kunlaboris kun lokaj rabistoj, kiuj eĉ ne sciis lian veran nomon. Pro tio oni ofte akuzis senkulpulojn anstataŭ Babinský, kiu fuĝis. Sed samtempe Babinský estis iomete infanisma, ĉar li ŝatis en gastejoj rakonti pri siaj aventuroj kaj troigis sian bravecon kaj ruzecon.

Se Babinský estis kaptita, ĉiam li neis.

Oni lin akuzis pri kvin rabadoj kaj unu murdo kaj juĝis lin al dudekjara malliberiĝo.

En malliberejo li diradis, ke estas senkulpa kaj estis trege pia.

Li estis en malliberejo en Brno (Špilberk) kaj en Kartouzy (Valdice) apud Jičín. Poste li en Řepy laboris kiel ĝardenisto de loka monaĥinejo, aspektis kaj kondutis kiel bonkora maljunulo. Paradoxse li, fama rabisto kaj murdisto, tiam plendis, ke „honesto homo preskaŭ devas timiĝi, se li iras tra la ŝoseo“.

Václav Babinský mortis la 1an de aŭgusto 1879.

## KARPATAJ BANDITOJ

### Ondřej Fuciman, Ondráš el Janovice (1680 – 1715)

Ondráš el Janovice, propranome Ondřej Fuciman, naskiĝis la 13an de novembro 1680 en vilaĝo Janovice, kie lia patro estis vilaĝestro. Sed Ondráš ne volis fariĝi vilaĝestro. Oni diras, ke li studis en piarista mezlernejo en Příbor. En la jaro 1695 li soldatiĝis kaj en armeo servis ĝis la jaro 1709.

En la jaro 1711 li banditiĝis kaj baldaŭ fariĝis estro de banditaro. Lia banditaro, en kiu estis ekzemple unu teksisto, unu ŝafpaŝtisto kaj unu almozanta eksa soldato, agis en Regiono Frýdek. Motivo estis akirado de havaĵo. Protokoloj atestas pri tio, ke banditoj sub la gvido de Ondráš ne diferencis riĉulojn kaj malriĉulojn. Ili prirabis ĉiujn.

Ondráš ŝatis drinki alkoholaĵojn kaj ĉasi virinojn.

Nokte, inter la 30an de marto kaj la 1an de aprilo 1715 en Sviadnov, en la gastejo „Ĉe patrino Hedvika“ Ondráš-on mortigis membro de lia banditaro Juráš, propranome Jura (Jiří) Jurášek Fuciman, el vilaĝo Malenovice, kiu estis ĉirkaŭ 37-jara, havis edzinon kaj kvin infanojn. Verŝajne motivo de Juráš estis ĵaluzo. Juráš uzis valaĥan hakilon.

Al Juráš helpis Jiří Polenda el Malenovice kaj tri aliaj banditoj.

Juráš kaj Polenda povis esti pro murdo de Ondráš premiitaj, sed pro siaj aliaj krimoj oni ilin ekzekutis (oni Jurášon pendigis la 17an de aprilo 1717). Aliaj tri rabistoj, kiuj al ili helpis Ondráš-on mortigi, finis en galero en Rijeka.

En Silezio kaj Valaĥio oni pri Ondráš rakontas multe da fabeloj, kantas popolkantojn. Ondráš inspiris multajn ĉeĥajn kaj polajn verkistojn, poetojn (Petr Bezruč, la poemo „Ondro“ en la poemaro Sileziaj Kantoj), komponistojn kaj pentristojn. Laŭna vira popoldanco nomiĝas „Ondrášův skok“ („Salto de Ondráš“). Ekzistas armea danca ensemblo Ondráš.

Spite de legendoj kaj romantikaj pentraĵoj nek Ondráš nek Juráš estis altstaturaj maldikuloj, sed mezaltaj dikuloj.

## **Portaŝoj**

*En la jaro 1717 en Valaĥio oni fondis grupon de voluntuloj, kiuj protektis moravian-hungarian limon kaj kaptis banditojn. Laŭ latina vorto porta (pordego) ili nomiĝis portaŝoj. Ili vestiĝis en popolajn kostumojn (sen rangaj signoj). Iliaj armiloj estis pafiloj, valaĥaj hakiloj kaj specialaj ŝnuroj kun metalaj globoj. Ili la ŝnurojn uzis por kaptado de homoj. Grupestro estis leŭtenanto, la grupo havis unu ĉefсарĝenton, unu vicĉefсарĝenton, kvin kaporalojn kaj 54 simplajn portaŝojn. Portaŝejoj situis en Hrozenková, Lidečko, Hošťálková, Bystřička, Čeladná, Karlovice kaj Noclehy. La portaŝoj funkciis ĝis la jaro 1830.*

## **Juraj Jánošík (1688 – 1713)**

Pri neniu alia bandito ekzistas tiel multe da legendoj ol pri Juraj Jánošík, malgraŭ ke lia bandita kariero daŭris eĉ ne plenajn du jarojn.

En januaro 1688 en Terchová naskiĝis al Anna Cesneková kaj Martin Jánošík filo, kiun oni en Varín baptigis.

En tiu tempo feŭdalismo kulminis kaj vivkondiĉoj de kamparanoj plimalboniĝis. Multaj el ili fuĝis el bienoj aŭ ribelis kontraŭ nobeloj. En la unua duono de la 18a jarcento en Karpatoj ekzistis centoj da banditoj. Al la plej famaj banditestroj apartenis Prócpak, Ondráš, Oleksa Dovbuš, Portasz kaj Baczyński, Marcaj, Jakub Surovec, Rajnoha, Klimczak.

La banditismo daŭris ĝis komenco de la 20a jarcento.

Kiam Jánošík naskiĝis, la vilaĝo Terchová apartenis al nobeloj el Löwenburg, eksaj generaloj de habsburga armeo, kiu antaŭe batalis kontraŭ ribelantoj de Imre Thököly. *(La ribelantoj en la jaroj 1671 – 1711 nomiĝis kurucoj. Tiel nomataj kurucaj militoj finis en la jaro 1711 pere de Szathmara Paco inter la kurucoj kaj habsburga imperiestro Karolo la 6a.)*

Legendo pri Jánošík, kiun ĉeĥa verkisto Alois Jirásek aldonis al ĉeĥaj legendoj, eksplikas, ke Jánošík studis, por fariĝi pastro, kaj banditiĝis por venĝi morton de sia patro, kiu pereis en malliberejo. Vero estas alia. Jánošík neniam studis, li havis tri gefratojn, kaj liaj gepatroj vivis pli longe ol li.

La 26an de septembro 1703 hungara nobelo Francisko Rákoczi la 2a promesis al homoj, ke se ili partoprenos en lia kontraŭhabsburga ribelio (kuruciĝos), ili ne plu pagos impostojn. Juna Jánošík soldatiĝis (li kuruciĝis en la jaro 1707) kaj batalis kontraŭ habsburgoj. Sed la 3an de aŭgusto 1708 oni lin kaj aliajn 400 soldatojn kaptis en batalo apud Trencsen (nuntempa Trenčín en Slovakio).

Por savi sian vivon, Jánošík ŝanĝis flagon kaj uniformon. Li fariĝis soldato de imperiestra (habsburga) armeo. En kastelo Bytča li gardis malliberulojn. Tie li amikiĝis kun sperta bandito Tomáš Uhorčík.

Gepatroj de Jánošík pagis al habsburga generalo Ebergéni multe da mono, por ke li ilian filon liberigu. Jánošík revenis en Terchová. Tomáš Uhorčík fuĝis el malliberejo kaj kaŝis sin en Velké Rovné. Li kaj Jánošík renkontiĝis, Uhorčík, kiu estis sperta banditestro (li travivis kvin jarojn de rabado kaj tri jarojn de maliberejo) Jánošíkon akceptis en sian rabistaron. Jánošík svoris (la 29an de septembro 1711) kaj partoprenis en rabado ĉe judaj komercantoj en Vsetín.

Sed ne ĉiuj rabistoj Uhorčíkon obeis kaj krom tio Uhorčík trovis bonan fianĉinon kaj volis edziĝi. Pro tio li forlasis la rabistaron, ŝanĝis sian nomon (Martin Mravec) kaj la 5an de oktobro 1711 edziĝis kaj setliĝis en vilaĝo Klenovec. Sed li subtenis la banditojn, ekzemple Jánošík ĉe li povis transvintri. Kiam oni Mravecon kaj Jánošíkon malliberigis (1712), danke al kontaktoj de Mravec kun regionaj potenculoj oni ilin liberigis.

Dokumento el la jaro 1712 atestas, ke Friedrich Löwenburg akuzis ĉiujn vilaĝanojn de Terchová, inkluzive de vilaĝestro, ke ili helpas al banditoj, nome al Jánošík.

Sed en la jaro 1713 oni lin kaj Mravecon denove kaptis.

Oni Jánošík-on akuzis de murdo de pastro el Domaniž, sed tiun murdon faris aliaj du banditoj. Jánošík ne estis murdisto.

Oni Jánošíkon kruele torturis kaj ekzekutis per hako, kiun ekzekutisto pikis en lian korpon. Tiu ekzekuto, kiun ofte faris turkoj, estis tre dolorema kaj longtempa. Jánošík mortis de ŝoko, perdo de sango kaj sangotoksiĝo. Oni lian tombon neniam trovis.

Oni lian amikon Mravecon radumis.

Sed kial potenculoj elektis por Jánošík tiel kruelan formon de ekzekuto?

Jánošík estis danĝera. Li estis juna, sed jam havis batalajn spertojn el armeo. En lia predo estis ne nur multe da mono, sed ankaŭ tiel multe da drapo, ke ĝi sufiĉus por 300 soldatoj. Verŝajne Jánošík kun aliaj eksaj rakoczianoj preparis novan kontraŭhabsburgan ribelion.

En la jaro 1935 oni faris la unuan filmon pri Jánošík. Slovaka aktoro Paľo Bielik ludis ĉefan rolon.

*Bedaŭrinde la nomon de Jánošík misuzis slovakaj faŝistoj. Kampa armeo Bernolák, kies komandanto estis generalo Ferdinand Čatloš, havis tri diviziojn, la unua el ili havis nomon „Jánošík“ (kolonelo Anton Pulanich). La 1an de septembro 1939 tiu ĉi slovakaj armeo helpis al germanaj nazioj ataki Pollandon, kiu la 9an de oktobro 1939 devis kapitulacii. Paradokse la nomo de slovakia popola heroo, kiu tiel multe sopiris pri libereco, estis misuzata por malliberiĝo de aliuloj.*

### **Michal Vdovec (1803 -1832)**

Michal Vdovec (ankaŭ Dovec, Vdovec, Doučík k. a.) naskiĝis la 28an de februaro 1803 en la vilaĝo Henkovce.

Jam kiel 12-jara li servis en armeo kaj apud Ŝtrasburgo oni lin akuzis pri ŝtelado de ĉevaloj.

Lia bandita kariero komenciĝis en la jaro 1820, kiam li dizertis kaj revenis hejmen.

Li kelkfoje estis malliberigita, sed kvinfoje fuĝis el malliberejo. Oni lin dufoje kondamnis al morta puno, sed Vdovec ĉiam saviĝis. Li prirabadis ne nur riĉulojn, sed ankaŭ malriĉulojn.

Kelkaj vilaĝanoj inkluzive de vilaĝestro de Henkovce al li helpis.

Li rabis en ĉirkaŭaĵo de Henkovce, escepte de unu longa vojo en Pollando (Zakopane).

Oni lin pendigis la 28an de decembro 1832.

### **Oleksa Dovbuš (1700 - 1745)**

Oleksa Dovbuš (ukraine Олѣкса Дóвбуш, ankaŭ Doboŝĉuk, Dovboŝĉuk aŭ Doboŝ) naskiĝis en la jaro 1700 en la vilaĝo Peĉenjijin (aliaj fontoj mencias Rungur-on kaj Jablunjiv-on). Lia patro apartenis al la plej malriĉa socia tavolo, li estis ŝafpaŝtisto. Ankaŭ Oleksa kaj lia frato Ivan paŝtigis ŝafojn.

Oleksa edziĝis, en la jaroj 1741-1745 lia edzino partoprenis en agadoj.

Lia bandita agado komenciĝis en la jaro 1738. Tiam li ankoraŭ agis kune kun sia frato Ivan. Ili finance subtenis siajn gepatrojn.

Sed en la jaro 1739 la fratoj disiĝis kaj Ivan per hakilo vundis Olekson, kiu poste ĝis fino de sia vivo lamis.

Danke al atakoj kontraŭ riĉuloj vilaĝanoj Dovbuŝon ŝatis nomante lin "savanto".

La 24an de aŭgusto 1745 en Kosmaĉ Stefan Dzvinĉuk lin vundigis per pafado pro tio, ke Dovbuŝ kun kelkaj banditoj volis perforte eniri lian domon.

Dovbuŝ perdis tiel multe da sango, ke mortis.

## Nikola Šuhaj (1898 – 1921)

Nikola Šuhaj, ukraïne Микола Петрович Сугай, naskiĝis la 3an de aprilo 1898 en Njiĝna Koloĉava. En la jaro 1917 li soldatiĝis en la 85a hungara regimento, kie ellernis subskribiĝi (hungare: Suhai Miklós), sed li neniam batalis, ĉar dizertis.

Li edziĝis kun Erĵika Draĉova (1905-1987). Ĝendarmoj de Hungario, Rumanio kaj (post Malgranda Kontrakto Saint Germaine, 1919) ankaŭ Ĉeĥoslovakio lin vane kaŝis. Ĉirkaŭ la jaro 1920 Šuhaj kun grupo de aliaj viroj banditmaniere atakis homojn, ŝtelis en preĝejoj kaj kabanjoj. Oftaj liaj celoj estis judoj, sed ankaŭ rutenoj kaj ukrainoj, kiuj revenis el Usono kaj havis monon, kiun eksterlande gajnis. Bedaŭrinde Šuhaj uzis violencon kaj mortigis homojn, li pafmortigis ekzemple ĝendarmojn. Lia pli juna frato Ivan, puberulo, estis eĉ pli kruela ol Nikola.

Vilaĝanoj ilin subtenis, plej multe kaŭze de timo.

En junio 1921 Šuhaj li elbruligis kabanon de loka vilaĝano Ivan Derbaĉok. Šuhaj kun tiu ĉi viro havis iun konflikton. La 13an de aŭgusto 1921 fratoj Šuhaj Derbaĉokon eĉ pafmortigis.

Pro tio (krimo kontraŭ loka homo) la vilaĝanoj Šuhajojn jam ne plu subtenis. La 16an de aŭgusto 1921 tri eksaj amikoj (Adam Ivaniĉ, Ivan Burkal, Danjilo Markus) ebriiĝis lin kaj lian fraton Ivanon (15.5-jaran) kaj poste ilin mortbatis per hakiloj. Ili ŝtelis 6 030 kronojn kaj aliajn aĵojn de mortintoj kaj nur poste alvokis ĝendarmojn. La ĝendarmoj faris lastan foton de mortaj Šuhajoj.

Krome romano de Ivan Olbracht kaj simila romano de Jaromír Tomeĉek, oni pri Nikola Šuhaj kreis muzikalon Balado por Bandito (libreton verkis Milan Uhde, ĉefajn rolojn ludis Miroslav Donutil kaj Iva Bittová).

## Diferencoj inter rabistoj kaj banditoj

Laŭ Carsten Küther kaj Adam Votruba, la historiistoj, kiuj specialiĝas pri historio de rabistoj kaj banditoj, ekzistas signifaj diferencoj inter rabistoj de Bohemio kaj Moravio (Grasel, Babinský) kaj karpataj banditoj (Ondráš, Jánošík, Vdovec, Dovbuš, Šuhaj). Limo inter regionoj, kie agis rabistoj kaj banditoj estas rivero Morava (okcidente de la rivero agis precipe la rabistoj, oriente de la rivero la banditoj).

Rabistoj Grasel kaj Babinský vivis inter vagantoj. Ili agis kaŝe kaj anonime (uzadis nomojn de aliuloj). Ilia motivo estis nur predo. Ili agis en grandaj teritorioj kaj lokaj homoj ilin ne subtenis. La rabistoj parolis specialan slangon.

En Karpatoj estis aliaj vivkondiĉoj, pro tio ankaŭ formo de rabado estis alia.

Karpataj banditoj devenis el familioj de vilaĝanoj. Ili agis uzante siajn proprajn nomojn. Ilia motivo estis predo, sed iam ankaŭ venĝo kaj eĉ rezisto (Jánošík). Lokaj homoj ilin subtenis, se ili atakis fremdulojn, riĉulojn kaj nobelojn, sed ne toleris atakojn kontraŭ homoj el propra komunumo (Šuhaj). La banditoj portis lokajn popolajn kostumojn kaj parolis lokajn dialektojn.

## Signifo

Kelkaj rabistoj kaj banditoj estis famaj. Pri Grasel kaj Babinský oni kantis butikistajn kantojn, kiuj ne akiris altan artistan nivelon, sed amuzigis homojn.

Karpataj banditoj fariĝis objektoj de legendoj kaj folkloro. Homoj facile forgesis, kiujn malbonojn la banditoj faris kaj per rakontoj kreis miton pri honestaj kaj justaj popolaj herooj, kiuj "priŝteladis riĉulojn kaj pridonacadis malriĉulojn".

Banditoj ne povis transpaŝi siajn proprajn ombrojn, tio signifas, ke ili ne volis ŝanĝi reĝimon, al kiu ili apartenis.

Legendoj pri trezoroj, kiujn la banditoj kaŝis, estas nur fabeloj. La banditoj devis multe da mono pagi al informistoj, pricelistoj, ili aĉetis silenton de subtenantoj kaj alibiojn, subaĉetis oficistojn kaj ĝendarmojn.

Sed se ne ekzistus la banditoj, ni ne havus riĉan folkloron. Epoko de banditismo ĉe ni finis en komenco de la 20a jarcento. Pri banditoj oni povas rakonti legendojn, kanti kantojn, komponi muzikon, sed pri rabistoj ne.

Bedaŭrinde admirindaj banditoj malaperis, nur fiaj rabistoj svarmas.

## Rekomendita literaturo

- BEZRUČ, P. 1970: Sileziaj kantoj. 1a eld., Opava, Památník Petra Bezruče, 121 paĝoj.
- BOTTO, J. 1962: Smrť Jánošíkova. 3a eld., Bratislavo, Mladé letá, 53 paĝoj.
- FRANCEK, J. 2002: Dějiny loupežnictva. Zloději, loupežníci, lupiči, pytláci a žháři v českých dějinách. 1a eld., Prago, Rybka Publishers, 370 paĝoj.
- GAŠPARÍKOVÁ, V. 1966: Zbojník Mišo Vdovčík. 1a eld., Bratislavo, Mladé letá, 164 paĝoj.
- KMENT, Z. 2026: Divoké historiky partyzánské. Aby přežili, museli si zbraně i jídlo ukrást. <https://medium.seznam.cz/clanek/kment-divoke-historiky...> 2026-02-18.
- KÜTHER, C. 1987: Räuber und Gauner in Deutschland. Das organisierte Bandenwesen im 18. und früher 19, Jahrhundert, la 2a eld., Göttingen-Zürich.
- 'LIBUŠKA' 2026: Zrada v Tatrách: Slovensko v roce 1939 pomáhalo Hitlerovi zaútočit na Polsko. <https://medium.seznam.cz/clanek/libuska-zrada-v-tatrach...> 2026-02-16.
- MOYZESOVÁ, N. 2019: Mimo zákon. Zbojníci, zloději a loupežníci na našem území. 2a eld., Prago, Nakladatelství XYZ, 294 paĝoj.
- OLBRACHT, I. 2018: Nikola Šuhaj loupežník. 1a eld., Prago, Československý spisovatel, 253 paĝoj.
- PÍSKOVÁ, M. 1997: Zbojnické variácie. 1a eld., Opava, Slezská univerzita v Opavě, Filozoficko-přírodovědecká fakulta, Ústav historie a muzeologie, 107 paĝoj.
- SOBOTKA, R. 2025: Beskydští zbojníci, lapkové a loupežníci. 1a eld., Vimperk, Víkend, 151 paĝoj.
- TOMEČEK, J. 1972: Mezi dvěma výstřely. 1a eld., Ostrava, Profil, 181 paĝoj.
- TOMEČEK, J. 1990: Zlatá mandragora. 1a eld., Prago, Albatros, 156 paĝoj.
- VOTRUBA, A. 2009: Václav Babinský. Život loupežníka a loupežnická legenda. 1a eld., Prago, Libri, 157 paĝoj.
- VOTRUBA, A. 2010: Pravda u zbojníka. Zbojnictví a loupežnictví ve střední Evropě. 1a eld., Prago, Scriptorium, 500 paĝoj.

## Personaĵoj

- Aleš, Mikoláš (1852 – 1913)
- Bezruč, Petr, propranome Vladimír Vašek (1867 – 1958)
- Bielik, Paľo (1910 – 1983)
- Bittová, Iva (\*1958)
- Botto, Ján (1829 – 1881)
- Čatloš, Ferdinand (1895 – 1972)
- Donutil, Miroslav (\*1951)
- Jirásek, Alois (1851 – 1930)
- Olbracht, Ivan, propranome Kamil Zeman (1882 – 1952)
- Rákócsi la 2a, Francisko (1676 – 1735)
- Thököly, Imre (1657 – 1705)
- Tomeček, Jaromír (1906 – 1997)
- Uhde, Milan (\*1936).
- Votruba, Adam (\*1974).